# la naska fasko

*La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto*

Numero unu
2009-06-29
lundo


## Noto de la redaktisto

Saluton, kaj bonvenon al la kursaro! Mi estas Hoss FIROOZNIA, via helpinstruisto. Mia tasko estas redakti la *NASKan Faskon* kaj organizi ekster-kursajn programojn posttagmeze, vespere, kaj semajnfine. Mi strebas riĉigi vian tempon ĉi tie ĉe NASK, do ne hezitu kontakti min se vi havas demandojn aŭ se vi bezonas helpon. Vi trovos min en *Asante* #127, kaj mia telefonnumero estas (###) ###-####. Mi respondos viajn demandojn en Esperanto—kaj, laŭbezone, en la angla lingvo.

### *Kio okazos hodiaŭ?*

**7:30 ptm: Interkona vespero**
Renkontu viajn najbarojn!
**Kie:** La komuna salono, en la teretaĝo (unua etaĝo) de *Cuzco*.

Mi ĝojas prezenti al vi la unuan numeron de la *NASKa Fasko* por 2009, la 40-a jaro de nia kursaro.

La *Fasko* estas la tagĵurnalo de nia kursaro, kaj ĝi aperas lunde-vendrede. Kutime mi provas presi ĝin antaŭ la tagmanĝo. Se mi ne trafos vin persone por doni al vi vian ekzempleron, serĉu ĝin en la ujo ĉe mia pordo (*Asante #127*).

Memoru: **viaj verkoj** igas la *Faskon* interesa kaj riĉigas nian komunan sperton ĉi tie. Mi kuraĝigas vin verki pri io ajn, kio interesas vin: pri viaj spertoj ĉi tie, viaj hobioj, viaj opinioj… ne gravas, ĉu vi estas komencanto aŭ spertulo: mi feliĉe helpos vin korekti kaj poluri, se vi volas.

Mi senpacience kaj avide atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn…

Sendu materialojn rete al la adreso **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ simple portu ilin piede al *Asante* #127.



**Eskurs-ebleco: Glisilejo**

Ĉu vi iam deziris flugi per glisilo (senmotora aviadilo)? Sur la klifoj apud la kampuso de UCSD troviĝas glisilejo, kie oni povas mendi flug-lecionojn—aŭ simple sidi, trinki limonadon kaj spekti. Ĉu ni iru?

# Noto de instruisto Lee (Liĉjo) MILLER

Saluton, kaj Bonvenon!

Mi feliĉas ke vi estas ĉi tie en bela—nu, belega—La Jolla, ĉe UCSD por la 40-a sesio de ***NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto***. De 1969 ĝis hodiaŭ en Usono oni povas studi Esperanton en oficialaj universitataj kursoj.

Vi estas tridek lernantoj, la plej granda grupo de post 2001. Vi estas tre diversa grupo, de aĝoj 17 ĝis 80-iom, el pluraj landoj. Dek unu el vi jam studis ĉe NASK antaŭe, sed dek naŭ estas novaj partoprenantoj. Kelkaj el vi estas studentoj, kelkaj laborantoj, kelkaj emeritoj. Malofte oni vidas en universitato grupon de tiom da malsamaj homoj... sed jen unu el la bonaj efikoj de Esperanto: la lingvo ja kunligas homojn, ne ekzistas bariloj de aĝo, nacieco, aŭ laboro.

NASK estas speciala sperto, tre unika en Usono, kaj efektive en la mondo. Oni malofte povas vivi en Esperanto-komunumo dum tri semajnoj. Tial mi havas por vi tri konsilojn:

Ĉe NASK vi povas uzi Esperanton ĉiutage, tuttage, de vekiĝo ĝis endormiĝo… en la lecionoj, dum ekskursoj, en la manĝejo, en la loĝejo, en grandaj grupoj kaj malgrandaj grupoj, sidante, promenante, ludante… Mi volas kuraĝigi vin paroli ofte, paroli en Esperanto kaj ne dependi de la angla aŭ aliaj lingvoj, kaj ankaŭ aŭskulti la paroladon de aliaj. Se vi emas silenti, gravas kontraŭbatali tion! Hejme vi povas lerni preskaŭ ĉion pri Esperanto, sen instruisto kaj sen kurso. Ĉi tie, tamen, vi povas lerni kiel paroli, kaj kiel kompreni la parolan lingvon, en tre aktiva formo. La tri semajnoj rapide pasos—ne perdu la ŝancon uzi Esperanton kiel eble plej ofte.

Ĉiu, kiu lernas novan lingvon, troviĝas ie de komencanto ĝis spertulo, sed neniu parolas perfekte. Eble vi pensas, “Ho, mi ne parolas bone, se mi diros ion mi eraros, pli bone mi silentu.” **Mmm, ne**. Lernado de lingvo **postulas** erarojn. Ĉiu eraro estas ŝanco ricevi korekton kaj lerni ion novan pri la lingvo. Ne hezitu pro timo de eraroj; male, eraru kuraĝe! Kaj ne malfeliĉu pri korektoj; ili estas unu el la plej grandaj helpoj kiujn vi povas ricevi.

Fine, se ion vi ne komprenas, se io ne estas klara, se vi ne estas kontenta pri io… demandu, diru. Ne silentu. NASK estas via kursaro; ni volas ke vi ricevu tion kion vi deziras kaj bezonas. Vi povas demandi al iuj el la instruistoj, al Ellen, al Grant, aŭ al Hoss—ni ĉiuj estas pretaj helpi vin, klarigi aferojn, kaj trovi solvon al problemo. Ne estas stultaj demandoj; se vi ne komprenas ion, estas verŝajne ke aliaj ankaŭ ne komprenas.

Denove, bonvenon al ĉiuj. Mi feliĉas pri la multaj novaj—kaj malnovaj!—vizaĝoj en la grupo. Ĝuu la tri semajnojn, ĝuu San-diegon, ĝuu la Esperanto-komunumon, studu diligente, kaj ludu same diligente.

❧

Hello, and Welcome!

I’m happy that you’re here in lovely—well, beautiful—La Jolla, at UCSD for the 40th session of NASK: The North American Summer Esperanto Institute.

Since 1969, it has been possible in the U.S. to study Esperanto in regular university classes.

There are 30 of you, the largest group since 2001. And you're a very diverse group, ranging in age from 17 to 80-something, from several different countries. Eleven of you have been at NASK before, but 19 of you are new participants. Some of you are students, some are working, some are retired. It's not often that you find a group on a university campus with so many different kinds of people… but this is one of the effects of Esperanto: the language links people together without barriers of age, nationality, or work status.

NASK is a special experience, very unique in the U.S., and actually in the world. It's not often that you can live in an Esperanto community for three weeks. So I have three pieces of advice for you:

Here at NASK you can use Esperanto every day, all day, from the time you wake up until you fall asleep… in the classroom, on excursions, in the dining hall, in the apartments, in large or small groups, sitting, walking, playing… I want to encourage you to speak often, to speak in Esperanto, and not to depend on English (or other languages), and also to listen to the speech of others. If you have a tendency to be quiet, you need to resist that tendency! At home, you can learn just about everything about Esperanto, without a teacher and without a course. Here, however, you can learn how to speak, and how to understand the spoken language, in very active form. The three weeks will fly by—don't lose the chance to speak Esperanto as much as possible.

Everyone who is learning a new language is somewhere from beginner to expert, but no one speaks perfectly. Maybe you're thinking "Oh, I don't speak well, if I say something I'll make a mistake, I'd better just be quiet." **Mmm, no**. Learning a language **requires** errors. Each error is a chance to get feedback/correction and to learn something new about the language. Don't hesitate because you're afraid of making a mistake. In fact, just the opposite: Make mistakes boldly! And don't be upset by feedback or corrections; they are one of the most important kinds of help you can get.

And last, if you don't understand something, if something isn't clear, if you're not happy about something… ask a question, say something. Don't just be quiet about it. NASK is your program; we want you to get out of it what you want and need. You can ask any of the instructors, Ellen, Grant, or Hoss—we're all ready to help you, clarify things, and find a solution for problems. There are no "stupid questions"; if you don't understand something, probably others also don't understand it.

So again, welcome to everyone. I'm happy to see all the new—and old!—faces in the group. Enjoy the three weeks, enjoy San Diego, enjoy the Esperanto community, study hard, and play equally hard.


Amike, Lee MILLER/Liĉjo
<lamiller@centurytel.net>

## Nia ĉi-jara teamo:

- Ellen EDDY — Administranto
- Lee MILLER — Instruisto—Post-baza nivelo
- David JORDAN — Instruisto—Progresiga nivelo
- Spomenka ŠTIMEC — Instruisto—Supera nivelo
- Hoss FIROOZNIA — Helpinstruisto
- Grant GOODALL — Direktoro

## Komuna libromendo

Ofte dum NASK ni komune mendas librojn de la libroservo de Esperanto-USA por minimumigi sendo-kostojn kaj ricevi rabatitajn prezojn pro amasa aĉeto. Ĉu vi dumlonge volis havi iun vortaron, lernolibron, novelaron, ktp? Jen via ŝanco mendi iom malmultekoste. Se ni mendos pli ol tri librojn, kiujn eldonas Esperanto-USA, ni ricevos trionan rabaton por ĉiuj.




Jen listo de kelkaj. Trovu la tutan katalogon rete, ĉe:

**http://esperanto-usa.org/retbutiko**

Se vi volas partopreni en la komuna mendo, sciigu vian helpinstruiston Hoss en *Asante #127*.

- *Being Colloquial in Esperanto (a reference guide)* de David K. JORDAN. 235p. Malmola bindaĵo.$15.00
- *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Peter J. BENSON. 607p. Mola bindaĵo. $27.00
- *Esperanto: Learning and Using the International Language* de David RICHARDSON. Malmola bindaĵo. 368p. $15.00
- *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertilo WENNERGREN. 696p. Malmola bindaĵo. $27.00
- *Step by Step in Esperanto* de Montagu C. BUTLER. 281p. Malmola bindaĵo. $13.00